

# VENEZUELA

## STELO

Organo de VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO  
34-a Jaro = N. 78 = 1-a Semestro 2006

ISSN 1316-0451

---

### ĈU NI RAJTAS SILENTI?

La titolo kompreneble aludas al la horaraj okazantaĵoj kiuj en ĉi tagoj denove kontraŭstarigas popolojn al popoloj, mortigas senkulpajn infanojn kaj plenkreskulojn, detruas urbojn kaj kamparojn, estigas malsaton kaj doloron, en iaspeca feroca konkurso inter homoj kaj naturo.

Krome, la titolo ne estas originala elpensajo de la verkanto, sed de la nun Prezidanto de UEA, Renato Corsetti, kiu sub ĝi publikigis artikolon en la revuo *Esperanto* N° 1035 (jaro 1992). En tiu jaro, kiel en la nuna, sed vere en ĉiu jaro, la mondo estis "trakurata de malbonaĵoj, militoj, rasaj malamoj, sociaj premoj, manko de manĝaĵoj kaj atakoj al bakejoj, kiel en la mezepoko...".

Je la epoko en kiu aperis la originala artikolo de Corsetti, multaj Esperantistoj, same kiel en la nuntempo, nur okupiĝis pri la lingvaj aspektoj de Esperanto. Al multaj aliaj, engaĝitaj en la Movado, pli ol la lingvo interesis la ideologio pri homaj interrilatoj, kaj tiuj sentis kordoloron pro la hororo de la maljusteco, la malamo inter gentoj, la perforto, la malobservo de la homaj rajtoj kaj sennombraj alispecaj malbonaĵoj.

Pensi ke la nuntempaj esperantistoj ne havas la samajn ecojn estas stultaĵo. Ankaŭ ni, esperantistoj de la nuntempo, estas aŭ lingvistoj aŭ movadanoj. Do, la demando kiun Corsetti faris iam al si mem kaj al la ceteraj esperantistoj restas aktuala: ĉu ni rajtas silenti? Mia persona respondo estas: **ne kaj jes**.

**Ni ne rajtas silenti**, sed male ni devas plendi kaj kondamni principe ĉiujn supre menciitajn malbonaĵojn, kaj alvoki la prudenton, la toleremon, la komprenemon, la kunlaboron, la diplomatiajn solvojn de la malfacilaĵoj. **Ni jes rajtas silenti** kiam la kritikoj kaj la plendoj koncernas determinitajn individuojn, homgrupojn kaj registarojn, precipe en politikaj kazoj. Persone, ĉiu esperantisto respondecas por si mem; sed koncerne la organizitajn Esperanto-grupojn, kaj precipe UEA-n, estas nepre necesa observi la statutan neŭtralecon, aŭ unue modifi la statutojn. Ĉi-kaze, kiu pretus same riproĉi la invademan Usonon kaj la invaditajn subpremitajn nacion? Kiu same kondamnas la rusian registaron kaj la sendependemajn ĉeĉenojn? Israelon kaj aliflanke Hezbollah kaj Sirion kaj Iranon? Tion ni lasu al la internaciaj Organizoj, eĉ sciante ke ili ne havas la povon altrudi iun ajn rezolucion. Ni ne forgesu ke ni, esperantistoj, estas samlingvanoj pli ol samideanoj, ke ni

estas anoj de diversaj gentoj kaj el diversaj landoj kaj apartenas al la diversaj kontraŭstarantaj flankoj. Ĉu ni povas riski apartigon inter ni? Pli konvenas al ni resti bonfara sed neŭtrala organizo, iaspeca Internacia Ruĝa Kruco, preta helpi ĉiun ajn, ene de la ebleco kaj senkonsidere de la deveno.

Andrés Turrisi

VENEZUELA STELO

Apartado 47675, Caracas 1041 – A  
<http://www.esperanto-ve.org>  
[esperanto-en-venezuela@yahoo.com](mailto:esperanto-en-venezuela@yahoo.com)

REDAKCIA KOMISIONO: Félix García Blázquez, Jorge Mosonyi,  
Esperanza Pérez, Nancy Aquino  
Andrés Turrisi.

ELDONANTO: VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO  
Apartado 47675, Caracas 1041 – A  
<http://www.esperanto-ve.org>  
[ven\\_esperanto@yahoo.com](mailto:ven_esperanto@yahoo.com)

ESTRARANOJ:

PREZIDANTO: Andrés Turrisi  
VIC-PREZIDANTO: Jorge Mosonyi  
ĜENERALA SEKRETARIO: Juan Miranda  
KASJISTO: Esperanza Pérez  
VOĈANOJ: Félix García Blázquez  
Esteban E. Mosonyi  
Nancy Aquino  
Rikardo Coutinho

KOMISIITOJ:

BIBLIOTEKO KAJ LIBROSERVO: Rikardo Coutinho  
ELDONAJOJ: Nancy Aquino  
VENEZUELA STELO: Andrés Turrisi.  
KLERIGADO: Félix García Blázquez  
PRELEGOJ: Esteban E. Mosonyi  
KONSILANTOJ: Félix García Blázquez,  
Esteban Mosonyi, Alfredo Portillo.

ENLANDAJ DELEGITOJ: Hctor Delgado T. (Mérida),  
Alfredo Ovalles (Maracay),  
Germán Montero (Maracaibo),  
Jesús R. Cedeño (Maturín kaj Ciudad  
Bolívar).

JUNULARAJ AFEROJ: Rikardo Coutinho

ATENTIGO

Pri la enhavo de niaj artikoloj respondecas iliaj aŭtoroj.

Manke de indiko de la aŭtoro, respondecas la redakcio.

Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigataj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton.

Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligus al ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborantojn.

## NACIAJ NOVAĴOJ

La Venezuela Esperanto-Asocio kunvenis la 18-an de februaro 2006 en Ĝenerala Asembleo, por daŭrigi la programon neelĉerpitan okaze de la Asembleo okazinta la 26-an de novembro 2005. Necesis nomumi la novan Estraron por la periodo 2006-2007.

La kunveno rezultis sufiĉe brua kaj varma, kaj estis scenejo

de vigla interŝanĝo de krudaj pritaksoj kaj akuzoj inter du kontraŭaj grupoj kiuj havas nenion komunan krom intereson kaj pasio pri Esperanto. La diferencoj daŭradis du-tri jarojn, kaj manifestiĝis iom post iom en diversaj okazoj. Ĉifoje ni havis la eblecon pritrakti ĝisfunde la temon, komplete konigi niajn personajn vidpunktojn, senrezerve ataki unu la alian, sed en civilizita etoso kaj, laŭ mia persona vidpunkto, sen minimuma intenco agredi aŭ ofendi.

Kiel rezulton de la klarigoj, ni atingis la necesan repaciĝon, kiu espereble permesos al nia movado eliri el la stagnanta situacio kiu ĝin karakterizis dum longa kaj ne rekuperebla tempo. La nova Estraro, kiun konsistigas membroj el la du iamaj grupoj, jam eklaboris, kaj klopodas efektiviĝi la unuajn erojn de laborplano kiu emas revigligi la lokan movadon.

Bedaŭrinde, la ĵusaj decidoj apartigis kelkajn radikalajn membrojn; sed espereble foriris, almenaŭ momente, la fantomoj de certe pli noca skismo.

\* \* \* \* \*

Spite al niaj klopodoj, ni ankoraŭ ne sukcesis eldonigi la tradukojn de gravaj verkoj de Simón Bolívar. La daŭraj kontaktoj kun la Bolivarana Societo de Venezuelo donas motivaĵon por optimismo, ĉar ties estraranoj entuziasme apogas la projekton. Financaj limigoj ne ebligis ĝis nun la publikigon de la verko, sed ni atendas pacience kelkajn pliajn semajnojn. Poste ni serĉos aliajn kandidatojn.

\* \* \* \* \*

Inter la 24-a kaj la 29-a de januaro Karakas gastigis la Mondan Socian Forumon. Nia Asocio ne partoprenis en Esperantaranĝoj, sed Prof-ro Johano Negrete, kiel reprezentanto de la Esperanto-Amikaro, aktive partoprenis kaj organizis diversajn eventojn. Ĉeestis geesperantistoj el diversaj landoj, sed krom Vilhelmo Lutermano, kiu partoprenis pasie je sia propra nomo kaj en la nomo de Le Monde Diplomatique, ŝajnas ke la ceteraj venis al Karakas precipe por turismi. Ne mankis televidaj kaj radiaj intervjuoj, kaj la vorto "Esperanto" kaj ĉi ties celoj atingis la orelojn de pluraj miloj da personoj.

\* \* \* \* \*

Lastatempe kreskiĝis en la sidejo de la Asocio la kvanto da libroj kaj revuoj venintaj el diversaj fontoj: interŝanĝoj kun aliaj asocioj, donacoj fare de membroj, reveno de materialoj provizore kuŝantaj ĉe kelkaj estraranoj ek de kiam ni devis lasi la lokalon pruntedonitan de la lasta gastiganto. Tio kreis veran problemon, pro la malordo nun reganta kaj la nepra neceso reorganizi nian bibliotekon. Nia Ĝenerala Sekretario kontaktis iun studentinon pri bibliotekologio, kiu akceptis volontule labori por klasifi profesie niajn librojn kaj revuojn. Tio konstituas unu el la unuaj kaj prioritataj eroj de nia laborplano.

# INTERNACIAJ NOVAĴOJ

En junio pli ol 2000 personoj estas aliĝintaj al la 91-a Universala Kongreso kiu laboros en Florenco, Italio, de la 29 de julio ĝis la 5-a de aŭgusto. La evento disvolviĝos laŭ interesaj eroj kaj vasta programo, kaj krom kontentigi la esperantistajn interesojn de la partoprenantoj, ankaŭ pravigos la viziton al unu el a plej interesaj urboj de Italio, riĉega je elementoj historiaj, kulturaj kaj turismaj.

\* \* \* \* \*

Jam oni konas la sidejon kaj daton de la venontjara Universala kongreso. Ĝi okazos en Jokohamo, Japanio, de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto.

\* \* \* \* \*

Por la deka fojo en kvin jaroj, grupeto da esperantistoj gvidataj de Giovanni Conti levis naŭ panelojn kun la literoj kiuj konsistigas la vorton "ESPERANTO", en la Placo Sankta Petro, en Vatikano, okaze de la paskaj salutoj de la Papo en pluraj lingvoj. La afero, do, jam estas tradicia. La novaĵo, tamen, estas ke ĉijare la bondezirajn vortojn en Esperanto diris unufoje Papo Benedikto la 16-a, daŭrigante la tradicion starigitan de Papo Johano Paŭlo la 2-a.

\* \* \* \* \*

Prof-ro Luis Santos Morales, Prezidanto de Kolombia Esperanto-Ligo, informas ke la 12-a Tutlanda Kongreso de la kolombiaj esperantistoj okazos de la 14-a ĝis la 16-a de oktobro 2005 en la ĉe-Otuna urbo Perejro. Venezuelana Stelo instigas ĉiujn esperantistojn, precipe la venezuelajn kaj la amerikajn, partopreni amase en tiu evento, kiu konsiderante la bone konatan sperton de niaj najbaroj, sendube rezultos sukcesa el ĉiuj vidpunktoj.

\* \* \* \* \*

Interesa propono por la "Disvastigo de la Lingvo Universala en ĉiuj komunumoj de la mondo pere de la Publikaj Bibliotekoj" venas de la kuba esperantisto Inĝ. Andrés Rodríguez González. Temas pri iniciato kiun li sukcesis efektiviĝi en la Biblioteko "René O. Reiné" de la Municipo Diez de Octubre, Provinco Ciudad Habana, ekde aprilo 2004, kaj kiun li intencas eksporti tutmonden, sed precipe kaj komence al Venezuelo, Rusio, Vjetnamio, Ĉinio, kaj iom poste al Bolivio, Brazilo kaj Argentino, Landoj politike proksima al Kubo. Kial ne ankaŭ al la ceteraj landoj de Ameriko? (rimarko de la redaktoro).

Por detalaj informoj bonvolu direkti korespondaĵojn al:

**Inĝ. Andrés Rodríguez González**  
**Vía Blanca N° 311, Apto. 3**  
**c/ San Julio y Durege, Santos Suárez**  
**Ciudad Habana = CP 10500 (CUBA)**  
**Tel. 40-1926**

\* \* \* \* \*

## KLASIFO DE AFIKSOJ

Félix García Blázquez

La afiksoj estas klasifeblaj laŭ la Akademio de Esperanto (1) kaj diversaj aŭtoroj en: substantivajn, adjektivajn kaj verbajn .

Tiu ĉi klasifado aspektas iom simpla ( aŭ simplisma), ĉar la realo estas pli komplika. Efektive, ekzistas almenaŭ du kriterioj por klasifi ĉi tiujn morfemojn: unue al kiu vortspeco oni aplikas la afikson kaj due, la rezulto de tiu apliko, t.e, ĉu oni ŝanĝas la kategorion de la vorto aŭ ne (2).

Tiurilate, oni povas klasifi ilin en alsubstantivaj, aladjektivaj kaj alverbaj, kio signifas ke ili povas aplikiĝi respektive al la koncernaj vortspecoj. Ekzemploj de alsubstantivaj estas la sufiksoj (neoficialaj) "oza" kaj "eska".

Efektive, de "poro" oni derivas "poroza" kaj de "japano" oni derivas "japaneska". Kiel oni povas konstati ŝanĝiĝas la kategorio, pro tio ni povas diri ke la nomitaj sufiksoj estas adjektivigaj pro ke ili transformas en adjektivojn la sufiksitajn vortojn. Alivorte, la dua kriterio por klasifi tiujn morfemojn, laŭ la ŝanĝoj de la vortkategorio estas: substantivigaj, adjektivigaj kaj verbigaj.

Fakte, la realo estas pli kompleksa, sed mi faras tiun formuladon por komenci la diskutadon de la temo.

Ni analizu la signifon de la termino "apliki"

Ĝi konsistas en preni ekzemple, la vorton "sablo", eliminante la finaĵon, kaj anstataŭe oni metas la morfemon "oza", pro kio la rezulto estas "sabloza".

Ekzemplo de substantiviga sufikso estas "-eco" kiun oni aplikas al adjektivo "bela", de kie devenas "beleco". Tiu sufikso estas samtempe aladjektiva kaj substantiviga.

Ekzistas ankore aliaj "sufiksoj", kiuj estas aplikebiaj al substantivoj, adjektivoj kaj verboj, kiel ekzemple ; "-et-", "-eg-" kaj "-aĉ-", sen ŝanĝo de kategorio. Ekzemple:

"Infaneto, beleta, dormeti" en kiuj la metodo de apliko estas iom diferenca: ĉar la afiksojn oni insertas en la vorto, ŝanĝiĝas la signifoj, sed ne la kategorioj, pro tio, ties koncepto pli proksimiĝas al tiu de infikso (H infijo, F infixe, A infix), se ni konsideras ke "infikso" estas afikso kiun oni insertas en la vorton.

Rilate al prefiksoj, oni povas diri ke ili estas aplikeblaj al determinitaj specoj de vorto, kaj en kelkaj okazoj, ekz. de la substantivoj, kiel "ge-" nur oni aplikas ĝin al vivantaj estaĵoj, kaj por la prefikso "bo-", al difinita klaso de parencoj

## Bibliografiaj notoj

Aktoj de la Akademio. 1963-1967 p.63 kaj sekvaj.

Félix García Blázquez. *Skizo por racia teorio de vortigado* (p. 40)

Waringhien k Kalocsay. *Plena analiza gramatiko de Esperanto*.

# SENUTILAJ GESTOJ

Aŭtoro: Luis Britto García  
Elhispanigis: Jorge Mosonyi

-Kiu konvinkos infanojn ke estas senutile saluti preterpasantajn aviadilojn aŭ malproksimajn ŝipojn?

-Kiam ni kontraŭstaros la impulson ekdirektadi kiam la diskuturnilo aŭdigas simfonion?

-Iumomente ni falas en la tenton alparoli hundon aŭ katon kiu per komprenemaj okuloj nin atente rigardas.

-Oni ne scias kial okazas en keglo-ludo ke bulĵetanto kredas ke, per unu piedo en la aero kaj movante la manojn, povas malebligi ke la bulo devojiĝu lasante la keglojn starantaj.

-Infanoj seniluziiĝas ĉiam petante la benon por ke la alparolito, anstataŭ doni ĝin, diru "Dio vin benu".

-Ni metas nin en la lastan lokon de la vicoj kvankam ni scias ke vicoj kreskas antaŭe.

-Medikamentoj ne utilas ĉar post mallonga tempo la bakterioj imuniĝos aŭ la scienco malkovros ke ili estas kontraŭindikendaj.

-Frenezuloj parolas al neniu, dum ni parolas al ni mem, kio estas la samo.

-Oni legas ĉiam la horoskopon, kiu nenion enhavas krom ĝeneralaĵojn pri san-zorgado, am-aventuro kaj incidento kun nekonato.

-Oni deziras sanon antaŭ la drinkaĵo kiu okazigos heptan cirozon.

-Ni konservas la garantiaĵojn de hejmo-maŝinoj, kiuj ne garantias kontraŭ fabrikdifektoj, netaŭgaj partoj aŭ misfunkciado.

-Ni diskutadas kun drinkemuloj, misadaptitaj kaj rafinituloj.

-Ni zorge tralegas ĉiujn artikolojn enhavantajn konsilojn pri sano, kiujn ni neniam sekvas.

-Ni enkestigas tekstojn atendante ke ili maturiĝu.

-En nia infanaĝo, kiam ni kuŝiĝis ni klopodis rimarki la ekzaktan momenton je kiu ni endormiĝas.

-Ni klopodas rememori ĝuste tion kion ni forgesis.

-Ni legas kritikojn pri libroj kiujn ni ne legis, sed ankaŭ pri tiuj kiujn ni legis.

-Kelkiuj pugnobatas la aeron por revigliĝi boksiston en la ringo.

-Des pli malbone se ili tiel agas vidante tion per televido.

-Kiam ni estis infanoj, dum matineo ni kriadis avertante Tarzanon ke la esploristo estas batonta lin de malantaŭe.

-Post terno ni diras "sanon", kaj antaŭ manghoj "bonan apetiton".

-Ni plue skribadas.

## Senutilaj aĵoj

-La kravato, kiu nur taŭgas por ke ni neniam certu ĉu ĝi kombiniĝas.

-La kravatpremiloj, kiuj estas uzataj nur por io kio ne devus esti uzata.

- La ŝu-tiriloj, kiuj necesas por malmolaj ŝuoj kiujn oni ne devas surmeti.
- Ĉio lastamoda, kio estas farita por elmodiĝi.
- La videokasedoj, per kiuj ni surbendigas filmojn kiujn ni neniam revidos.
- La spegulo, en kiu ni vidas nin ĉiufoje pli maljunaj.
- La alarmiloj, kiuj sonoras je ĉiuj tridek sekundoj.
- La restadejoj, kiuj neniam disponigeblas kiam estas bezonataj.
- La ĉenetoj kun sanktuloj, kiuj anstataŭ nin protekti allogas atakantojn.
- La loteri-biletoj, kiuj ne surhavas certigon ke ili estos premiataj.
- La "high-tech"-gaĝetoj, kiuj antaŭ ol ni lernas ilin uzi, jam estas malaktualiĝintaj.
- La harkreskigiloj.
- La agoj, kiujn ni neniam kunportas kiam necesas noti rendezuon kiu nin interesas, kaj pleniĝas je rendezuoj kiuj nin ne interesas.
- La manikteniloj, kiuj ne necesas ĉar ĉiuj ĉemizoj havas butonon en la maniko, kaj kiujn ni ne trovas kiam ni surmetas ĉemizon por manikteniloj.
- La suveniroj, kiuj nin memorigas pri tio kion ni ĉiumaniere memoras.

## Senutilaj serĉadoj

- La Dorado (ora lando), kiu situas ĉiam pli malproksime.
- La Eterna Juneco, kiun trovas nur tiu kiu mortas juna.
- La Sankta Gralo.
- Serĉi tion kion oni neniam perdis.
- Serĉi en krucvortenigmoj certajn vortojn, kiel "speco de lamenbrankulo".
- La papereto sur kiu oni notis la numeron de Roksana.
- La tri piedoj de la kato.
- La paro de la perdita ŝtrumpo.
- La grava novaĵo en la kolumno de ĵurnaloj kiun ni gardas por havi ĝin ĉemane.
- Tiu de la peco de la puzlo kiu ĉiam mankas.
- Tiu de la tempo perdita dum ni klopodis profiti la tempon.
- Tiu de la ideo pri kio ni eĉ ne havas ideon.
- Tiu de la klarigo de ĉio.
- Tiu de la klarigo de la klarigo.
- Tiu de la senso de tiu ĉi artikolo.

## Senutilaj antaŭzorgoj

- Bone konduti.
- Ne esti sin baninta je Sankta Vendredo por ne iĝi fiŝo.
- Malŝalti la radion de la aŭtomobilo kiam oni eniras tunelon ĉar la elektrostatiĝo povus ĝin difekti.
- Ne trinki lakton kiam oni manĝas bananon ĉar tio laŭdire malsanigas.
- Porti ombrelon, ĉar kiam oni ĝin portas certe ne pluvos.
- Flankenrigardi ĉiam kiam la grip-trafita ternas, por ke li ne infektu nin.
- Klopodi ne esti snobo.

-Noti nuntempe en poŝ-telefonon, kiuj estos forigitaj post dekkvin tagoj pro nepago.

-Paroli al la plantoj, kiuj retiris al ni la parolon.

-Porti mapon, kiu neniam enhavas la kvartalon al kiu oni volas iri.

-Kuntiri la kapon post kiam aŭdiĝis la pafado.

-Aspergi nin per insektoforpelilo, kiu neniam forpelas moskitojn.

-Sin resanigi estante sana, kio estas tiel absurda kiel ne sin resanigi estante malsana.

-Tremi la barbon, ĉar tio nur utilas kiam oni volas sin razi.

## Senutilaj atendadoj

-Kiom ofte ni restas en kinejo atendante ke iu malbona filmo pliboniĝu.

-Spite al ĉio ni prokrastas aĉeton atendante ke la prezoj malaltiĝu.

-Ni transiras al la vico kiu moviĝas sciante ke ĝuste kiam ni eniros ĝi ĉesos moviĝi.

-Ni gardas malnovajn vestaĵojn atendante ke ili reenmodiĝu.

-En la monujo ni ĉiam trovas bileton de la pasintjara kristnaska loterio, kiun ni gardis kredante ke ni memoros certigi ĉu ĝi gajnis antaŭ ol ĝia eksvalidiĝo.

-Ankoraŭfoje ni atendas ke moliĝu la koro de tiu kiu nin tiom suferigas.

-Ni fermas la okulojn atendante ke la sonĝo nin kaptu endormiĝintaj.

-Ni insistas atendi ke la kondiĉoj plenumiĝu.

-Ni pririgardas ĉiujn belulinojn al kiuj ni ne gravas.

-Ni atendadas la fal-stelon kiu preterpasos antaŭ ol ni petos la deziron.

-Ni atendadas la deziron pli efemeran ol la fal-stelo.

**Noto pri la aŭtoro kaj la teksto:** Pri la aŭtoro ni ripetas ĉi tie kion ni skribis en la pasinta numero de V. S. (Nº 77, 2005):

“Luis Britto García (Karakas, 1940) estas elstara verkisto kiu jam publikigis pli ol kvindek librojn, en diversaj genroj: romano, novelo, teatro, esejo, historio. Li gajnis dufoje la internacian premion “Casa de las Américas” (Kubo) kaj ricevis en Karakas la Nacian Premion pri Literaturo kiel rekono pro la tuto de lia verkaro. Krome, li estas advokato, universitata profesoro, prelegisto, humuristo kaj eĉ karikaturisto kaj subakva esploristo.”

La teksto kiun ni prezentas ĉi-supre aperis en sia originala hispana formo la 20-an de novembro 2005, en la ĵurnalo “Últimas Noticias” de Karakas, kie Britto García aperigas humurkolumnon ĉiudimanĉe. Ĝia stilo estas leĝera kaj konciza, plena je freŝa humuro, sed samtempe profunde signifa, ĉar la aŭtoro, per etaj eldiraĵoj kaj malmultaj vortoj, esprimas kritikan vidpunkton pri ĝenerale akceptitaj kutimoj, moroj kaj ideoj. Li ŝajnas priridi preskaŭ ĉion, banalaĵon aŭ solenaĵon, eĉ foje sin mem, (ni memoru la titolon de unu el liaj libroj: *Me río del mundo (Mi priridas la mondon)*). Tamen, kiel okazas ĉe aŭtenta humurismo, oni divenas malantaŭ la spritaĵoj seriozan kaj saĝan viv-filozofion.

## ENLADAJ SARDINOJ

Panĉo Eristegieta, inter kvardek- kaj kvindek-jaraĝa, eniris la modestan nutro-vendejon; unu el tiuj tute karakterizaj: la proprietulo kaj la kasisto estas la sama persono.

Li komencis serĉi inter la bretoj kaj fine li trovis kion li serĉadis: unu ladon de sardinoj en tomata saŭco. Kun stranga vizaĝo kontentec-esprima li sin direktis al la kasejo. Du personoj vice staris antaŭ li. Kiam la unua finpagis, la dua kapturnis al Panĉo.

- Sinjoro, vi nur havas unu ladeton, pasu antaŭen.

- Dankon.

Intertempe, ok personoj estis farinta vicon malantaŭ li. Eristegieta deponis sian sardinladon sur la vendotablon kaj alparolis la kasiston:

- Vi ne povas imagi kiom ekscitas min ĉi aĉetado – kaj li komencis plori despere, estigante miron en la kasiston kaj en la klientojn.

- Ehm... - la kasisto ne trovis vortojn... - kio okazas al vi?

Panĉo Eristegieta elprenis tukon kaj sekigis, dignece, la larmojn. Jam trankviliĝinte, li diris:

- Mi komprenas vian miron; unue, pro miaj larmoj. Kaj due, pro la natureco kun kiu mi akceptis ĉi tiun sardin-ladon.

- Vi akceptis? Vi ŝuldas al mi sepdek kvin centonojn!

- Sed kompreneble! Ne ekscitiĝu – li metis la tukon en sian poŝon – Kaj ĉu vi scias kial mi pagos al vi la sepdek kvin centonojn? – li faris paŭzon, atendante respondon kiu ne alvenis \_\_. Pro konfido!

- Sinjoro, mi ne povas perdi tempon – al la vico estis aliĝintaj du pliaj personoj -. Donu al mi la sepdek kvin centonojn kaj foriru.

- Ah, ne! – la voĉo de Eristegieta estis subite akriĝinta -. Se vi alprenos tian sintenon, nur restas al mi postuli miajn legitimajn rajtojn.

- Viajn rajtojn? Aŭskultu, sinjoro...

Panĉo Eristegieta ignoris la interrompon.

-Nun vi devos prui al mi ke tiu lado vere entenas sardinojn en tomata saŭco, kiel indikas la etikedo. Mia konfido tiurilate tute malaperis ĉe viaj evitemaj frazoj kaj viaj dubindaj esprimoj.

- Foriru \_\_ diris la kasisto per voĉo surda.

- Ne – diris per firma voĉo Eristegieta -. Ne antaŭ ol vi pruvu al mi ke tiu lado entenas sardinojn.

La homoj estis kirliĝantaj ĉirkaŭ Panĉon Eristegieta kaj la kasisto rimarkis en la ejo ke, iom post iom, la stranga persono estis kaptinta la simpation de la plimulto. Li ne povis fari ion alian: prenis elladigilon kaj malfermis la damnindan lad-skatolon.

- Vidu - li diris per voĉo triumfa -, ili estas sardinoj. Sardinoj en tomata saŭco, ekzakte kiel indikas la etikedo.

- Konsentite – akceptis, noble, Eristegieta. Li metis sepdek kvin centonojn sur la vendo-tablon -. Ĉu vi bonvolus donaci al mi plastikan saketon? Mi loĝas iom malproksime, ne posedas aŭtomobilon kaj kun ĉi malfermita lado, plena de sardinoj en tomata saŭco, mi povus ŝpruci min komplete.

La kasisto rigardis ĉirkaŭ sin: li estis venkita. Li donis saketon al Eristegieta. Ĉi lasta verŝis la enhavon de la lado en la saketon. Poste, zorge kaj malrapide, faris komplikegan nodon ĉe la aperturo.

- Dankon. Bonan posttagmezon. Ĝis la revido.

Post kiam Panĉo Eristegieta malaperis, la kasisto eksplodis.

- Al mi gravas malmulte tio, kion vi povas opinii, sed se tiu monstro restintus en ĉi vendejo unu plian sekundon, mi mortigus lin.

- Tiamaniere vi estus farinta seriozan eraron – diris iu voĉo trankvila, origina el iu sinjoro sufiĉe malalta, sufiĉe kalva, sufiĉe dika, sufiĉe monduma. Kaj daŭrigis -. Mi konas la historion de Panĉo Eristegieta, fakte tiel nomiĝas la sinjoro kiu ĵus eliris el ĉi lokalo, kaj mi povas certigi al vi ke li estas granda persono. Mi estas certa ke vi ĉiuj konsentus kun mi se vi permesus al mi rakonti, dum mallongaj minutoj, lian historion.

- Mi permesas al vi absolute nenion! – kriis la kasisto – Tiu ĉi estas nutro-vendejo kaj mi jam perdis duon-horon, dum kiu mi nur povis vendi unu ladon de sardinoj en tomata saŭco kaj, krome, mi devis ĝin malfermi kaj senpage doni unu plastikan saketon al tiu aĵo. Ne!

- Ni volas aŭdi la historion – diris iu sinjorino.

- Memkompreneble! – aldonis iu germano kiu kumportis sakon kun kvar kilogramoj de kolbasoj kun ajlo.

- Ke li rakontu – diris iuj.

- Ni estas scivolemaj – diris aliaj.

- Bone – la kasisto volis eliri el la inkubo -. Komencu. Sed bonvolu esti konciza, mi petegas vin. Mi havas tri filojn kaj...

- Kia koincido!! – ekkriis Surren, kio estis la nomo de la sinjoro sufiĉe monduma -. Ankaŭ Eristegieta. Pli bone dirite, li havis. Ne! – li faris geston por trankviligi la homamason -. Ili ne mortis. Okazas ke unu el ili troviĝas en Malgrand-Azio, alia en Ekvator-Afriko kaj la alia, tutcerte belega junulino, en la Galapagoj.

- Kaj kion respektive ili faras tie? Demandis la germano.

- Ili vendas sardinojn- diris, trankvile, Surren. Ladojn desardinoj en totata saŭco.

- La rakonto estis sufiĉe mallonga. Ĝi komenciĝis en enlatiga fabrikejo de sardinoj en totata saŭco.

- Neeble! – kriis la kasisto.

Tamen tiel estas – certigis Surren -. Havu paciencon. Kiam Panĉo estis proksimume tridek kvin jaraĝa lia onklo, Don Pepe Aristegieta, konata sardin-industriisto, proponis al li fariĝi vendo-direktoro en la entrepreno.

- Vi havas promes-plenan futuron, mia kara lunulo. Nur temas pri vendado de sardinoj. Unu el la plej facilaj aferoj en la mondo.

Eristegieta lasis sin konvinkiĝi. Dum kvin jaroj ĉio marŝis mirinde bone. Vere, vendi sardinojn estis plej facila afero, kaj ankaŭ fiŝi kaj enladigi ilin, kvankam li neniam okupiĝis pri tiu ĉi fazo de la produkto-procezo. Li vendadis. La profitoj estis enormaj.

Tamen, je la kvina jaro, Panĉo Eristegieta rimarkis ke okazadas io stranga. La vendadoj malaltiĝadis. La profitoj – konfidis al li la libro-tenisto – ĉiam pli etiĝis. Iun tagon la onklo vokis lin al sia oficejo.

- Panĉo – li diris koncize – ni estas en bankrota situacio.

- Tio ne eblas – ekkriis Panĉo.

- Tamen ne zorgu. Ni Ni havas ĉion kontrolata. Viaj sociaj prestaĵoj estos pagataj ĝis la lasta centimo.

- Dank' al Dio – diris Panĉo.

- Sed – aldonis la onklo . per ladoj de sardiniĵoj. Komprenu – li pludiris antaŭ la miro de Panĉo – nur tio restas al ni. Kvankam, verdire, unu lado de sardiniĵoj kaj unu Bank-bileto estas, finfine, la samo – li prenis profesoran voĉon - Kial la homoj aĉetas ladon de sardiniĵoj sen malfermi ĝin, nesciante kion ĝi entenas? Pro konfido. Ĉar ili estas certaj ke ene estas sardiniĵoj. Kial la homoj akceptas dudek-bolivarano monbileton? Ĉar ili estas certaj ke en la Centra Banko estas dudek bolivaraĵoj, aŭ io simila, kiu garantias tiun monbileton.

Li leviĝis el sia seĝo gestadante.

- Devizo, oro, specialaj trat-raĵtoj, ladoj de sardiniĵoj, ĉio estas la samo.

Li trinkis sorbon da akvo.

- Filo, forportu tiujn kvincent mil ladojn da sardiniĵoj. Vi tion dankos al mi.

La domo de Panĉo pleniĝis per ladoj de sardiniĵoj. Li komencis klopodi vendi ilin en la najbaraĵo. Sed li faris la eraron citi la vortojn de sia onklo. Kaj konvinkis la najbarojn ke lado de sardiniĵoj estis samvalora kiel mono. Do la homoj akceptadis la ladojn de sardiniĵoj de Panĉo vendante al li ion. La unuan tagon, kontraŭ dek ladoj de sardiniĵoj ili donis al li malnovan pantalonon. Poste, kontraŭ cent, unu tutan veston. Florpotoj, lul-seĝoj, pajlaj ĉapeloj komencis okupi la parton de la domo de Panĉo kiu vakiĝadis el ladoj de sardiniĵoj.

Panĉo Eristegieta decidis ke la afero ne povas daŭrigi tiamaniere. Necesis forporti la ladojn de sardiniĵoj eksterlanden, tien kie la homoj ne scias ke tiuj valoras same kiel monon nek konfidas ke, fakte, la enhavo estas sardiniĵoj. Tiel foriris liaj gefiloj eksterlanden. Hieraŭ la filino sendis al li, el Galapagoj, la monsumon korespondan al la unua vera vendo.

Kaj Panĉo volis permesi al si plezuron. Aĉeti, per mono, unu ladon de sardiniĵoj. Kaj li alvenis ĉitien. Li prenis unu ladon. Li sciis ke ĝi entenas sardiniĵojn. Li konfidis.

- Sed vi – Surren minacis la kasiston per la fingro – lin traŭmatizis per viaj ekskuzoj, per via dubema sinteno.

- Mi... - diris la kasisto.

- Vi.- ekkriis maljunulino lasante sian sakon surteren. – Ĝis neniam plu!

- Ĝis neniam plu! – tondris la germano, ŝetante la kolbasojn kontraŭ la plafonon.

- Monstro! – kriis iu sinjoro kun lip-haroj.

Inter insultoj kaj krioj, la kasisto sukcesis izoliĝi en angulon de la vendejo. Post dek sekundoj la lokalo estis dezerta.

Li prenis elladigilon kaj, unuope, malfermis ĉiujn ladojn de sardiniĵoj en tomata saŭco kiujn li posedis.

Ĉiuj enhavis sardiniĵojn en tomata saŭco. - Ververe – li pensis – la konfido de Eristegieta estis prava. Kaj mi dubigis lin. Mi estas kreteno.

**ASOCIACION VENEZOLANA DE ESPERANTO:**

**CUOTAS ASOCIATIVAS PARA EL AÑO 2006**

**MIEMBROS ACTIVOS (MA):**

- Una (1) cuota anual de Bs. 80.000 ó
- Dos (2) cuotas semestrales de Bs.42.000 ó
- Cuatro (4) cuotas trimestrales de Bs. 23.000

**ESTUDIANTES Y FAMILIARES (E/F) DE LOS MA:**

El 50% de la cuota para los MA

**MIEMBROS PATROCINANTES (MP):**

Además de la cuota AM pagan Bs. 8.000 mensuales

**ESPERANTISTAS DEL INTERIOR U OTROS AMIGOS DEL ESPERANTO:**

Una (1) cuota anual voluntaria de no menos de Bs. 40.000

**NOTA:** Las cuotas asociativas podrán pagarse:

- a) directamente a la persona encargada de la Tesorería
- b) con depósito en la Cuenta Corriente  
N° 01380020130200004778 de la Asociación Venezolana  
de Esperanto en el Banco Plaza.

**Favor informar al teléfono 0212 = 283.65.72 el número del comprobante de depósito, la cuenta bancaria, el monto y el nombre del depositante.**

---